

RAPORTO PRI LA LABORO KAJ FINANCOJ - JARO 2019



*Estimataj membroj de edukado.net, subtenantoj de la paĝaro.
Sube vi povas legi la raporton pri la jaro 2019, pri la tiamaj laboro kaj financaj aferoj de la
Fondaĵo edukado.net. Ni esperas, ke la raporto kaj niaj rezultoj kontentigos vin kaj vi daŭre
sekvos kaj subtenos nian laboron.*

I. ĈEFAJ AGADKAMPOJ.....	3
I. 1. Kursoj, trejnadoj.....	3
I. 2. Unufojaj agadoj dum la jaro.....	4
I. 3. Regulaj agadoj dum la jaro.....	4
II. STATISTIKO PRI LA RETEJO.....	5
II. 1. Nur kelkaj ciferoj.....	5
II. 2. Membroj laŭ landoj.....	5
II. 3. Uzo de la ekzercoj en la sekcio Instrumaterialoj.....	5
II. 4. Kampanjo por registrado de kursoj.....	6
III. PLIAJ AGADKAMPOJ.....	6
III. 1. Risko.....	6
III. 2. Kunpaŝado – nia nova projekto.....	7
III. 3. KER-ekzamenoj.....	8
III. 4. Ekparolu!.....	9
III. 5. Ĉeestaj kursoj kaj laboro dum UK en Lahtio.....	9
III. 6. Poznan: Interlingvistikaj Studoj.....	10
III. 7. Manlibro pri instruado de Esperanto.....	10
III. 8. Programista laboro kaj kostoj.....	11
III. 9. Monkolekta kampanjo – donacoj por la kilometroj de Katalin.....	11
III.10. DANKON al la kunlaborantoj kaj al ESF.....	11
IV. PLANOJ POR LA JARO 2020.....	12
IV. 1. Kunpaŝado.....	12
IV. 2. Klerigejo – liberaj studoj.....	12
IV. 3. Kursejo.....	13
IV. 4. Ekparolu!.....	13
IV. 5. Manlibro en la reto.....	12
IV. 6. KER-ekzamenoj.....	13
IV. 7. Informpaĝoj.....	14
IV. 8. Kursoj, Trejnadoj – daŭra kunlaboro ankaŭ kun ILEI.....	13
IV. 9. Diplomalaboradoj.....	14
IV.10. Malnovaj filmoj al ciferecaj formatoj.....	14
IV.11. Filmkursoj en Esperanto.....	15
IV.12. RISKO.....	15
IV.13. Bibliografia libro de Mila van der Horst-Kolinska.....	15
IV.14. Kontaktoj, kunlaboroj.....	15
IV.15. Teknikajoj pri la paĝaro.....	16
IV.16. Ni serĉas helpantojn por difinitaj taskoj.....	16

V. FINANCOJ	17
<i>V.1. Ĝenerala klarigo</i>	17
<i>V.2. Enspezoj en 2019</i>	17
<i>V.3. Regulaj subtenantoj bezonatas</i>	18
<i>V.4. Vojaĝoj</i>	18
<i>V.5. Multflanka subteno de ESF</i>	18
<i>V. 6. Donacoj por Edukado.net en la jaro 2019</i>	19
<i>V. 7. Resuma financa tabelo</i>	20
<i>V. 8. Kalkuloj de la specifaj monsumoj</i>	21
<i>V. 9. Detala raporto pri la en- kaj elspezoj en 2019</i>	21

KUNPAŜADO ĈIRKAŬ LA MONDO <https://www.youtube.com/watch?v=yyC-0afO8kw>



Esperanto-kurso en la familio Zamenhof



I. ĈEFAJ AGADKAMPOJ

- 3-7a majo – Hispanio – Malaga – Triobla kongreso, prelegoj, KER-ekzameno¹
- 15a de junio – 8a Tutmonda Ekzamentago
- 28a de junio ĝis la 13a de julio – Usono – Raleigh – (kurso, KER-ekzameno)
- 16-19a julio 4-taga marŝado, Nederlando– Nimego – kolekto de subtenmono
- 20-27a de julio Finnlando – Lahti – UK (kursoj, prelegoj, KER-sesio)
- 27a de julio – Finnlando – Lahti – Kolokvo pri esperantologio kaj interlingvistiko
- 14-29a de septembro – Pollando – Poznan UAM, ARKONES².
- 19a de oktobro – Francio, – Parizo – Katalin Kováts kaj Margaret Zaleski-Zamenhof gvidis Esperanto-rapidkurson por pra-pranepo de Ludoviko Zamenhof kaj liaj geamikoj.
- 20-25a de oktobro Francio – Kvinpetalo³ – Metodika kurso

Kompare al la antaŭaj jaroj eble la supra listo ŝajnas mallonga, sed ekskuzo povas esti, ke la redaktoro Katalin Kováts en 2019 plurfoje estis grave malsana, kio malhelpis ŝin en vojaĝoj kaj eksterlandaj kursumadoj. Prudenta organizado de gravaj kaj malpli gravaj laboroj kaj planado de kursoj estis necesa. Danke al tio nur unusolan kurson necesis nuligi, tiun de Nov-Zelando, kie la organizantoj trovis bonan solvon.

Katalin dum la jaro klopodis laŭeble ĉion aranĝi rete por ke la instruantoj de Esperanto havu la kutiman kaj kalkulitan helpon kaj subtenon. Espereble tio sukcesis kaj vi estis kontentaj.

I. 1. KURSOJ, TREJNADOJ

Ĉi-sube vi trovas liston pri la plej gravaj agadoj kaj taskoj, kiujn nia teamo efektivigis dum la jaro 2019. La menciitaj aranĝoj kaj produktoj plej ofte estas en la sekvaj paĝoj raportitaj ankaŭ pli detale kaj / aŭ vi trovas ligan al detalaj raportoj en la paĝaro mem.

Nia redaktoro, Katalin Kováts, kaj ŝia edzo, estrarano de la Fondaĵo Edukado.net, dum la jaro 2019 okazigis ĉeestajn lingvokursojn kaj trejnadajn.

- En Poznano, kadre de la 3-jaraj Interlingvistikaj Studoj komenciĝis la metodologia specialiĝo, kiun Katalin Kováts gvidas. Ĝin partoprenis 5 studentoj, al kiuj aldoniĝis 9 personoj, kiuj laŭ la aranĝo kun ILEI⁴ sekvas unujaran trejnadon. Fine de la sesio Katalin partoprenis ankaŭ per prelego la aranĝon ARKONES.
<https://edukado.net/novajhoj?t=2&id=799>
- En oktobro Katalin gvidis unusemajnan metodikan kurson en Kvinpetalo, Francio. La projekto EIT-Afriko⁵ alvenis al sia fino, kaj danke al la ĉeesta trejnado de Mireille Grosjean en Bujumbura, Afriko, kaj la reta preparo de Katalin Kováts finekzameniĝis 2 personoj.
- En julio Katalin Kováts partoprenis la someran kursaron de NASK⁶ en Raleigh, kie ŝi okazigis KER-ekzamenojn.
- En Finnlando, dum la kongreso Katalin K. kaj Sylvain Lelarge gvidis paroligajn kursojn je du niveloj, sume entute dum 16 lecionoj kun la partopreno de 100-120 personoj ĉiutage. Katalin kun Sylvain okazigis kaj gvidis dumkongresan KER-sesion, kie ŝi mem ankaŭ ekzamenis. Ili ambaŭ kontribuis per prelegoj al la programo de Kleriga Lundo⁷, krome Katalin prelegis ankaŭ en la Tago de Lernado⁸. <https://edukado.net/novajhoj?t=2&id=795>
- Tutjara mastrumado de la RITE⁹-kursanoj, kies materialoj kaj produktoj riĉigas la retejan kolekton.
- Kadre de la projekto *Ekparolu!*¹⁰ Katalin K. en 2019 okazigis 43 parolsesiojn, ŝia plej ofta nevino estis Margaret Zaleski-Zamenhof, kiun Katalin helpis perfektigi en la lingvo kaj prepariĝi al la C1-nivela KER-ekzameno.

¹ KER-ekzamenoj = Esperanto ekzamenoj laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro.

² ARKONES = Artaj Konfrontoj en Esperanto, tradicia kultura aranĝo en la pola urbo Poznan

³ KVINPETALO = Esperanto-Kulturcentro meze de Francio, en la vilaĝo Bouresse.

⁴ ILEI = Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

⁵ EIT-Afriko = Komuna projekto de edukado.net kaj ILEI, lanĉita en 2017 por trejni afrikajn esperantistojn pri instruado

⁶ NASK = Nord-Amerika Esperanto Kursaro

⁷ Kleriga Lundo: Tradiciaj programo dum la Universalaj Kongresoj kun paralelaj klerigaj seminarioj kaj atelieroj

⁸ Tago de Lernado = kutima programo de ILEI en mardo dum ĉiu Universala Kongreso

⁹ RITE = Reta Instruista Trejnado ĉe Edukado.net, metodologia kurso ellaborita kaj gvidata de Katalin Kováts.

¹⁰ *Ekparolu!* = programo de edukado.net, en kiu per skajpaj parolsesioj spertaj esperantistoj paroligas senpage komencintojn.

I. 2. UNUFOJAJ AGADOJ DUM LA JARO

- Organizado de la KER-ekzamenoj: 2019 estis laŭkalendare la dek-dua ekzamenjaro en kies fino ni atingis sume 2407 sukcesintojn el 75 landoj. Okazis entute 10 memstaraj ekzamensesioj, el kiuj unu estis la *8a Tutmonda Ekzamentago*¹¹ kun 15 ekzamenlokoj. Al la ekzamenoj aliĝis entute 243 kandidatoj, fine ekzameniĝis nur 205 personoj el kiuj sukcesis 165 ekzameniĝintoj (76 %). Fiaskis 40 kandidatoj (24 %).
<https://edukado.net/novajhoj?t=2&id=807>
- Pretigo de reklamfilmo pri nia nova rojekto *Kunpaŝado*¹² <https://edukado.net/kunpashado>
- Pretigo kaj publikigo de filmo pri prelego de Katalin pri la kofro de Andreo Cseh¹³
<https://www.youtube.com/watch?v=tS9fiCfBGZ4&t=552s>
- Pretigo de nova naskiĝtaga salutfilmo (ni ne montras ĝin ĉi tie, atendu vian naskiĝtagon ☺).
- Ellaborado de la projektoplano de *Kunpaŝado* kaj kreo de la beta-versio de la programo.
- Laŭ la invito de ESF¹⁴, Katalin Kováts partoprenis en Lahti la Kolokvon pri Esperantologio kaj Interlingvistiko (KEI), kie ŝi gvidis la laborgrupon pri instruado, instruista trejnado kaj lerniloj.
- Katalin jam de 2013 flegis en Hago konatan esperantiston, Mila van der Horst-Kolinska, iaman regulan subtenanton kaj sponsoron de edukado.net. Ŝia lasta vivperiodo necesigis pli oftan flegadon. Ŝi forpasis en decembro. Post la forpaso de Mila van der Horst Katalin kaj ŝia edzo Sylvain devis prizorgi ĉiujn farenaĵojn pri la entombigo kaj anoncis la forpason ĉe IEI¹⁵ kadre de la Zamenhof-festo. <https://edukado.net/novajhoj?t=2&id=801>

I. 3. REGULAJ AGADOJ DUM LA JARO

- Gvidado de la laboro de *Konstanta Ekzamena Sekcio* (KES) de UEA.
- Ĉekomputila deĵorado por respondado pri demandoj, korespondado kun la membroj de la retejo, por helpi ilin en instruaj kaj metodikaj situacioj, konsili pri lingvoproblemoj ktp.
- Katalin K. prizorgas ankaŭ du Facebook-paĝojn kaj grupon. Regula anoncado de eventoj kaj atentigoj en la paĝaro de edukado.net kaj kuraĝigado en la fermita grupo de la genevoj kaj geonkloj de *Ekparolu!*, kie okazas ankaŭ neformala instruado de gramatikaĵoj kaj leksikaĵoj.
- Regula sendado de artikoloj kaj informoj al la revuoj IPR¹⁶ kaj ESPERANTO¹⁷, ĉefe pri la KER-ekzamenoj, agado kaj laboro ligita al la paĝaro.
- Laŭ peto de ESF kaj UEA¹⁸, Katalin K. gvidas la stipendian komisionon por la studentoj de Poznan. Aktive subtenas la studentojn per konsiloj kaj kolektas monhelpon por ili.
- Daŭra arkiva laboro estas sekvi la vivon kaj la morton de eminentaj esperantistoj, kolekti pri ili informojn, premie prezenti ilin en la *Panteono*¹⁹ de la paĝaro, kiu servas kiel fidinda informfonto por aliaj movadaj amaskomunikiloj kaj asocioj. En 2019 estis nove enpanteonigitaj 5 instruistoj de Esperanto. <https://edukado.net/novajhoj?t=2&id=803>
- Partprenado en la laborgrupo pri *Universitata Agado* (gvidata de Angela Tellier), kadre de kiu Katalin pretigis la universitatan parton de la KURSEJO kaj intervjuon kun Martin Ptasinski pri kiel enkonduki Esperanton en Universtatoj. <https://edukado.net/biblioteko/filmejo?iid=351>

¹¹ Tutmonda Ekzamentago = ĉiujare unu tago, kutime en junio kiam samtempe okazas KER-ekzamenoj en la tuta mondo.

¹² Kunpaŝado = nova projekto de edukado.net por kombini sanan vivon kaj Esperanton.

¹³ Andreo Cseh = fama Esperanto-pedagogo, fondinto de samnoma metodo, aganta ĉefe en al tridekaj jaroj.

¹⁴ ESF = Esperantic Studies Foundation <https://www.esperantic.org/eo/hejmo/> la plej grava sponsoro de edukado.net

¹⁵ IEI = Internacia Esperanto-Instituto, antaŭ Cseh-instituto, kun sidejo en Hago, Nederlando

¹⁶ IPR = Internacia Pedagogia Revuo, eldonita de ILEI

¹⁷ Revuo Esperanto = movada gazeto de UEA, Universala Esperanto-Asocio.

¹⁸ UEA = Universala Esperanto-Asocio

¹⁹ Panteono = Sekcio de edukado.net por prezenti meritplenajn Esperanto-pedagogojn, vivajn kaj forpasintajn

II. STATISTIKO PRI LA RETEJO

Detalajn statistikajn informojn pri la membroj kaj diversaj partoj de la paĝaro vi povas trovi en la statistika paĝo: <http://www.edukado.net/prie/sinprezento/statistiko?tipo=uzantoj>

II. 1. NUR KELKAJ CIFEROJ

Laŭ la mezuriloj inter januaro 2009 kaj la fino de 2019 estis entute 5 525 membroj el 135 landoj (en 2018 ni havis 5 236 membrojn) La kresko estis 299 novaj membroj, ĉar dum la jaro, pro duoblaĵoj kaj forpasoj, ni perdis kelkdekon da membroj. La nombro de novaj aliĝintoj, kompare al la antaŭaj jaroj malkreskis, sed havi preskaŭ ĉiutage unu novan membron ankoraŭ estas bona rezulto.

II. 2. MEMBROJ LAŬ LANDOJ

Jam de pluraj jaroj Francio estas je la pinto de la membrostatistiko. Ĝis decembro 2019 entute 751 francoj membriĝis kaj multaj el ili tre regule, preskaŭ ĉiutage, uzas la retejon. La ranglisto apenaŭ ŝanĝiĝis kompare al la du lastaj jaroj.

Novajn anojn ni varbas dum kongresoj, ĉeestaj kursoj, en artikoloj kaj publikaĵoj en Facebook en diversaj grupoj kaj paĝoj, sed multe helpas ankaŭ jamaj membroj, kiuj proponas nian paĝon al konatoj kaj amikoj.

Vidu detalojn de la statistikaĵoj pri la uzantoj: <http://www.edukado.net/prie/sinprezento/statistiko?tipo=uzantoj>

II. 3. UZO DE LA EKZERCOJ EN LA SEKCIO INSTRUMATERIALOJ

<https://edukado.net/instrumaterialoj>

En la kolekto *Instrumaterialoj* estas entute: 890 lerniloj, 131 510 elŝutoj kaj 2 758 komentoj.

Dum la jaro okazis 8 343 ekzercoelŝutoj kaj venis 62 komentoj.

La elŝutnombro de lerniloj en 2019 kreskis kompare al la elŝutoj en la pasintaj jaroj, kiam ni iusence fermis la elŝuteblojn por tiuj, kiuj ne registris kurson, ne estis kontribuantoj aŭ subtenantoj de la paĝaro. En 2019 kreskis la nombro de tiuj personoj, sed samtempe ni donis al kelkaj grupoj la uzrajton, ekzemple al la partoprenantoj de la *Ekparolu!*-programo, al tiuj membroj de ILEI, kiuj abonis kaj *IPR* kaj la revuon *Juna Amiko*²⁰, krome al diversaj trejnitaj kaj kursanoj.

Jaroj	Monatoj												Entute
	jan	feb	mar	apr	maj	jun	jul	aŭg	sep	okt	nov	dec	
2019	1223	428	2113	596	694	581	436	296	365	638	536	437	8343
2018	743	944	546	832	886	585	886	342	333	588	985	538	8208
2017	199	880	768	763	694	493	786	1740	355	527	339	460	8004
2016	682	562	650	445	560	347	559	490	580	658	1178	223	6934

²⁰ Juna Amiko = Revuo pro lernantoj de Esperanto, ekde komencinta nivelo. Eldoanĵo de ILEI.

II. 4. KAMPANJO POR REGISTRADO DE KURSOJ

Pro tiu fakto, ke la sekcio *Instrumaterialoj* aŭtomate malfermiĝas por tiuj, kiuj registras siajn kursojn, la situacio de la kursoregistradoj de jaro al jaro pliboniĝas, tamen ne estas ankoraŭ tute komplete.

Malgraŭ tio, ke kaj UEA kaj ILEI daŭre anoncas, ke **la oficiala kaj la sola kursostatistiko troviĝas ĉe edukado.net**, ni ne havas kompletan trarigardon pri la kurso-situacio en la tuta mondo.

Elire de la kelktagaj kursoj ĝis la tutjaraj, de movadaj kaj lernejoj, ni povas konstati, ke ni regule havas 70-80 registritajn movadajn kursojn kaj 30-40 lernejajn registraĵojn.

En la arkivejo troviĝas pliaj neaktualaj registraĵoj: 976 movadaj kursoj kaj 605 finiĝintaj lernejaj kursoj.



Tiu arkivejo konservas la registraĵojn, sekve eblas reserĉi kursojn, instruintojn kaj aliajn informojn. Espereble foje iu ŝatus serioze studi la fenomenon de Esperanto-kursoj en la mondo kaj en tiu situacio nia retejo povos doni valorajn informojn.

En la jaro ni ŝanĝis la strukturon de la KURSEJO kaj enkondukis novan sektion por la universitataj kursoj, kiu antaŭe estis kune kun ĉiuj aliaj lernejaj kursoj. La programŝanĝon antaŭis detala enketo per kiu kun kelkaj kolegoj el universitatoj ni kompilis novan formularon. Ĝi povos doni detalajn informojn pri la funkciaj kursoj, ebligas alŝutadon de kursoprogramoj kaj la interesiĝantoj povos ekscii pli pri la laboro en tiuj institucioj. Kompreneble la strukturo en si mem ne sufiĉas, necesas ke la kolegoj registru siajn kursojn, pri kio ni vaste alvokas tutmonde. La nova universitata parto de la kursejo estis lanĉita en februaro 2020. <https://edukado.net/novajhjoj?id=812>

III. PLIAJ AGADKAMPOJ


III. 1. RISKO

<https://edukado.net/ludoj>



Kvankam nia kleriga ludo estas ankoraŭ populara parto de la retejo, ĝi ne havas la same altan nombron de ludantoj, kiel antaŭe. Tage 50-60 personoj venas ludi.

Fine de 2019 ni havis precize 1 071 registritajn ludantojn el kiuj en 2019 venis 48 novaj riskemuloj. La malkreskon de la ludtagoj kaŭzas la nova regulo, laŭ kiu la ludantoj post 1 000 ludtagoj devige ripozas.



onklo

En 2019 okazis 9005 ludoj. Adiciante la ĉiumonatajn ludantojn ni vidas, ke partoprenis la ludon 760 ludantoj.

La tutjara ludon gajnis en 2019 **Miguel Rocha Bento el Brazilo**. Gratulojn al li.

Ni pripensas revivigi la ludon, kaj eble ekde la jaro 2021 denove malfermi por ĉiuj la ludeblojn.

Statistikaĵojn pri la ludo eblas vidi ĉi tie

<https://edukado.net/prie/sinprezento/statistiko?tipo=risko>

III. 2. KUNPAŜADO – NIA NOVA PROJEKTO

Por prezenti ĝin ni uzas la artikolon, aperintan en la marta numero de 2020, de la revuo Esperanto

Movado

Kunpaŝadu ĉirkaŭ la mondo esperantumante

Katalin Kováts

Kunpaŝado estas nova projekto de la porinstruista retejo edukado.net. Ĝi celas krei komunumon, por kies membroj gravas la sana vivo kaj la kunagado.

La kunpaŝantoj entreprenas regule sportumi, ĉefe paŝadi kaj virtuale ĉirkaŭiri la mondon kune.

La haltpunktoj de la itinero estas Esperanto-lokoj, konataj kaj malpli konataj centroj, kluboj, kelkfoje privatuloj, kiuj gastigas nian virtualan karavanan. La invitintoj prezentas sian agadon per son- aŭ filmmaterialoj, kiuj publikigas en la momento, kiam la virtuala karavano atingis ilian urbon.

Sed kiel moviĝas la karavano?

La kunpaŝantoj post ĉiu sportokazo registras en la paĝaro la faritajn kilometrojn aŭ la tempon, dum kiu ili sportis, kaj la individue faritaj distancoj sumiĝas kaj antaŭenirigas la karavanan.

La partoprenantoj estas interesataj regule sportumi por ricevi la donacojn, kiujn la redaktoro surprize aperigas de tempo al tempo. Temas pri sonmaterialoj aŭ muziko, kiuj povas servi kiel aŭskultendaĵoj dum la sportumado. Interesaj artikoloj pri naturo, medioprotektado, konsiloj de kuracisto, intervjuo kun sportumantaj esperantistoj, laŭtlegitaj literaturaĵoj aŭ klerigaj filozofumadoj ĉirkaŭ specifaj gramatikaj temoj. La sondosieroj akireblas nur dum kelkaj tagoj, do, valoras ne mistrafi ilin.

Por partopreni la projekton ne necesas esti sportisto. Ĉiu, kiu pretas regule movi sin almenaŭ kelkajn kilometrojn aŭ horojn semajne jam estu kun ni. En la karavano bonvenas ankaŭ fizike handikapitaj samideanoj, kiujn ni volonte kunvojaĝigas.

Per Kunpaŝado ni celas kombini la lernadon kaj aplikadon de la lingvo, kunigi Esperanto-komunumon, krei la mondmapon de Esperanto-lokoj kaj instigi la membrojn al pli sana vivmaniero.

La projekto nun estas en testperiodo, la reta platformo funkcias en provformo, dum kiu ni volas trovi la plej konvenajn formojn por la konstruo de la definitiva reta programo kaj observi la kutimojn de la membroj de la karavano.


Por kreado de la definitiva retejo ni serĉas programistojn, grafikiston, kaj kolektas subtenmonon. La komenca financan bazon formas la kelkmileŭra sponsorsumo, per kiu esperantistoj stimulis ĉiun kilometron de Katalin Kováts, kiu kun kelkaj esperantistoj en somero 2019 partoprenis la plej grandan amasmarsadon de la mondo, paŝante 140 kilometrojn en 4 tagoj, propagandante kaj instruante Esperanton inter la 38 mil kunpaŝantoj. Interesiĝantoj pri paŝado aŭ kunkonstruado de la programo povas trovi informojn en la retnaĵo <https://edukado.net>.



karavanan. La partoprenantoj estas interes-ataj regule sportumi por ricevi la donacojn, kiujn la redaktoro surprize aperigas de tempo al tempo. Temas pri sonmaterialoj aŭ muziko, kiuj povas servi kiel aŭskultendaĵoj dum la sportumado. Interesaj artikoloj pri naturo, medioprotektado, konsiloj de kuracisto, intervjuo kun sportumantaj esperantistoj, laŭtlegitaj literaturaĵoj, aŭ klerigaj filozofumadoj ĉirkaŭ specifaj gramatikaj temoj. La sondosieroj akireblas nur dum kelkaj tagoj, do, valoras ne mistrafi ilin.

Por partopreni la projekton ne necesas esti sportisto. Ĉiu, kiu pretas regule movi sin almenaŭ kelkajn kilometrojn aŭ horojn semajne jam estu kun ni. En la karavano bonvenas ankaŭ fizike handikapitaj samideanoj, kiujn ni volonte kunvojaĝigas.

Per Kunpaŝado ni celas kombini la lernadon kaj aplikadon de la lingvo, kunigi Esperanto-komunumon, krei la mondmapon de Esperanto-lokoj kaj instigi la membrojn al pli sana vivmaniero. La projekto nun estas en testperiodo, la reta platformo funkcias en provformo, dum kiu ni volas trovi la plej



konvenajn formojn por la konstruo de la definitiva reta programo kaj observi la kutimojn de la membroj de la karavano. **Por kreado de la definitiva retejo ni serĉas programistojn, grafikiston, kaj kolektas subtenmonon.** La komenca financan bazon formas la kelkmileŭra sponsorsumo, per kiu esperantistoj stimulis ĉiun kilometron de Katalin Kováts, kiu kun kelkaj esperantistoj en somero 2019 partoprenis la plej grandan amasmarsadon de la mondo, paŝante 140 kilometrojn en 4 tagoj, propagandante kaj instruante Esperanton inter la 38 mil kunpaŝantoj. Interesiĝantoj pri paŝado aŭ kunkonstruado de la programo povas trovi informojn en la

retpaĝo <https://edukado.net/kunpashado>

III. 3. KER-EKZAMENOJ <https://edukado.net/ekzamenoj/ker>

2019 estis laŭkalendaro la dek-dua ekzamenjaro en kies fino ni atingis sume 2407 sukcesintojn el 75 landoj.

En la 2019a kalendarjaro okazis entute 10 memstaraj ekzamensesioj, el kiuj unu estis la 8a Tutmonda Ekzamentago kun 15 ekzamenlokoj.

Okazis ekzamenoj en 24 diversaj urboj de 16 landoj de tri kontinentoj.

La apartajn ekzamensesiojn ni ebligis parte en la jam tradiciaj ekzamenlokoj, kiel en

- Greziljono (FR, Baugé en Anjou), Kalio (CO) kaj Moskvo (RU),

Kaj dum landaj kongresoj aŭ internaciaj aranĝoj: en

- Goiânia (BR) dum la brazilaj landa kaj junulara kongresoj;
- Malaga (ES) dum la hispana, andaluzia kaj fervojista triobla kongreso;
- Rimini (IT);
- dum IJF Liptovský Mikuláš (SK);
- dum la 75^a IJK;
- Raleigh (US) – dum NASK;
- kaj en Lahti (FI) dum la Universala Kongreso.

Al la ekzamenoj aliĝis entute 243, sed bedaŭrinde 38 personoj nuligis sian ekzameniĝon aŭ simple ne aperis en la ekzamenloko.

Fine ekzameniĝis nur 205 personoj el kiuj sukcesis 165 ekzameniĝintoj, tie estas 76 %.

(Fiaskis 40 kandidatoj, 24 %)

En la Tutmonda Ekzamentago partoprenis 134 personoj en la sekvaj lokoj:

- Ĉinio – 3 urboj: Ĉenduo, Pekino kaj Zaozhuang
- Japanio – 2 urboj: Ŝimonoseki kaj Tokio
- Francio – 2 urboj: Parizo kaj Fleury les Aubrais
-

kaj kun po 1 urbo: Bogoto (CO), Bostono (US), Guajakilo (EC), Herzberg am Harz (DE), La Chaux-de-Fonds (CH), Londono (GB), San-Paŭlo (BR) kaj Seulo (KR).

La plej sukcesa lando ĉi-jare estis Ĉinio, kie en tri urboj entute ekzameniĝis 56 personoj el kiuj sukcesis 31 kandidatoj.

La sekva plej diligenta lando estis Francio kun 27 sukcesintoj. En Francio en 3 urboj estis sesio, kaj aldone francoj ekzameniĝis ankaŭ en aliaj landoj.

Estas interese menci, ke kun la ĉi-jaraj ekzamenoj Francio entute nun atingis 556 diplomitojn.

La nomojn de la 2 407 sukcesintaj ekzamenitoj vi povas legi en nia *Fierlisto*:

<http://edukado.net/ekzamenoj/kandidatoj>




Kvanto de kandidatoj laŭ tempo (entute: 2407)

Jaroj	Monatoj												Entute
	jan	feb	mar	apr	maj	jun	jul	aŭg	sep	okt	nov	dec	
2019	0	0	0	19	12	106	23	5	0	0	0	0	165
2018	0	0	0	10	9	122	40	36	0	0	13	0	230
2017	0	0	0	0	0	109	52	0	0	0	0	0	161
2016	0	0	0	23	0	94	18	0	0	0	16	13	164
2015	18	0	0	22	87	0	50	0	0	0	0	0	177
2014	34	0	0	0	181	0	18	27	0	0	0	0	260
2013	0	0	0	22	0	210	29	10	0	0	18	0	289
2012	0	27	0	28	0	326	17	42	0	0	0	24	464
2011	0	13	0	34	31	0	125	18	0	5	0	0	226
2010	0	0	0	12	0	77	21	0	27	0	9	9	146
2009	0	0	0	12	13	0	59	0	10	0	0	23	117
2008	0	0	0	0	0	0	0	0	0	0	0	8	8

III. 4. EKPAROLU! <https://edukado.net/ekparolu>



Ni kore dankas niajn geonklojn de la jaro 2019, el kiuj la 12 plej laboremajn vi povas vidi ĉi-sube kun fotoj kaj ligiloj.



En 2019 *Ekparolu!* havis sian trian oficialan jaron.

El la 63 ekzameniĝintaj geonkloj²¹ laboris en tiu tempo 36 personoj el 28 landoj. Al la programo aliĝis ĝis nun preskaŭ 200 genevoj²² el 42 landoj. Ĝenerale la genevoj ricevas po 10 parolsesiojn, sed pluraj el la 63 finintoj havis 20, 30, esceptokaze eĉ 50 sesiojn. Dekoj el ili trapasis KER-ekzamenojn, ekaktivis en la movado. Kelkaj eksnevoj dumtempe fariĝis geonkloj kaj nun ili helpas al la komencintoj per parolsesioj.

En la provperiodo niaj geonkloj okazigis 150 sesiojn. Ni ne havas aŭtomatan registraĵon pri tio, kiuj laboris en tiu tempo.

En 2017 ni okazigis precize 700 sesiojn, en 2018 nur 513 kaj **en 2019 entute 387**.

Fakte ĉiusemajne ni proponas 400-450 sesiojn kaj el tiuj oni mendas 8-10 lecionojn.

Ni ne precize komprenas, kial la genevoj ne pli amase profitas el nia oferto kaj kial ili ne uzas la okazon ekzerci sin en la parolado.

La servon ni klopodas reklami inter Duolingo²³ kaj dum aranĝoj. Helpe de TEJO²⁴ publikigis reklamfilmeto pri *Ekparolu!* en kiu eksaj genevoj en siaj naciaj lingvoj (kun subtekstoj en Esperanto) rakontas pri siaj spertoj. <https://edukado.net/biblioteko/filmejo?iid=350>



Ni proponas al ĉiu kursgvidanto direkti la kursanojn al *Ekparolu!* por ke ili havu okazon paroli kun diversaj personoj el la tuta mondo.

Nia redakcio dankas ĉiujn kunlaborantajn geonklojn, el kiuj la 12 plej diligentajn ni aparte kolektis kaj planas premii per librodonaĵoj. Speciale laŭdendas **Anjo Amika el Hungario**, kiu en 2019 entute 47 fojojn donis lecionojn al la genevoj.

III. 5. ĈEESTAJ KURSOJ KAJ LABORO DUM UK EN LAHTIO



La plej grava publika apero de edukado.net okazas dum la Universalaj Kongresoj, kie la retejo povas aktive montri sin antaŭ la publiko. La entuziasma teamo de edukado.net (Katalin Kováts, Sylvain Lelarge, Mónika Molnár, Margaret Zaleski-Zamenhof kaj Nicole Wing) jam en la movada foiro ĉe tri tabloj akceptis la interesiĝantojn. Ili montris la paĝaron, raportis pri la projektoj, varbis por la ekzamenoj kaj informis pri *Ekparolu!*. Katalin kaj Sylvain jam de 17 jaroj gvidas la paroligajn kursojn dum la kongreso. La dumlecionaj aktivaĵoj baziĝas sur la ekzercoj kaj materialoj de la paĝaro, kaj tiel la aranĝo estas bona okazo ne nur por lerni novajn esprimojn kaj akiri novajn spertojn, sed ankaŭ por instruistoj kaj klubgvidantoj partopreni aŭ almenaŭ observi la lecionojn.

²¹ Geonkloj = spertaj esperantistoj, kiuj helpele donas lingvolecionojn en la programo *Ekparolu!*

²² Genevoj = lernantoj en la programo *Ekparolu!* Al kiuj al geonkloj helpas per skajpaj lecionoj.

²³ Duolingo = studentoj aŭ studentoj en DUOLINGO

²⁴ TEJO = Tutmonda Esperantista Junulara Organizo



La kursoj okazas en du grupoj. Por komencantoj estas dum 4 tagoj 8 sinsekvaj lecionoj. Tiuj, kiuj partoprenas ĉiun lecionon, fine ricevas atestilon. Por mezniveluloj, la alia kurso, por kies partopreno necesas minimume A2-lingvonivelo, estas entute 8, sed nur 4 diversaj lecionoj. La du lecionoj de la sama tago pli-malpli identas, do, ni konsilas partopreni nur po unu lecionon tage.

Dumkongrese Katalin mem partoprenis ankaŭ en la programoj de la Akademio kaj prelegis dum la *Tago de Lernado*, aranĝo de ILEI. En la duhora programo de la *Kleriga Lundo* Katalin gvidis sesion pri *Kunpaŝado*, la nova projekto de edukado.net, Sylvain prelegis kun Hori Jasuo pri nekutimaj objektoj. Dumkongrese okazis ankaŭ KER-ekzameno, sed ĉi-jare, malgraŭ la preparlaboro, kun nur malmultaj kandidatoj. La ekzamenadon organizis kaj gvidis Katalin Kováts, kun la helpo de Mónika Molnár kaj Sylvain Lelarge.

Dum la bankedo de la kongreso la 5 estraranoj de la Fondaĵo Edukado.net vespermanĝis kune kaj pritraktis kelkajn labortaskojn. Detalan raporton kaj la horaron de UK vi povas legi en nia novaĵo ĉe <https://edukado.net/novajhoj?id=795>



III. 6. POZNAN: INTERLINGVISTIKAJ STUDOJ



Edukado.net estas en laborkontakto kun la *Interlingvistikaj Studoj (IS)* en Poznan. Katalin Kováts jam de pli ol 10 jaroj partoprenas en la tiea laboro, gvidas la metodikan formadon de la studentoj, en ĉiu tria jaro de la studoj. La retejo jam de pluraj jaroj donas spacon en la KLERIGEJO, kie la studentoj de *IS* povas sekvi siajn studojn kaj inter la konsultiĝoj povas labori helpe de edukado.net. ESF (kunlabore kun UEA) krome taskis al Katalin gvidi la komisionon, kiu respondecas pri la aljuĝo kaj disdonado de la studstipendioj de ESF.

Edukado.net helpis ankaŭ rekte en la kolektado de subtenmono, kiuj ekde 2017 devas iri al ESF, en la kampanjo AMU POZNANON, t.ly/xq05p

Kadre de tiu kampanjo ESF ĝis 2500 dolaroj duobligas la ricevatajn donacojn. Bedaŭrinde por la studjaro 2019-2020 nur du donacoj venis ĝis nun al la kaso.



La studentoj venas el diversaj partoj de la mondo, krom el Eŭropo ankaŭ el aziaj landoj, el Brazilo kaj Usono. La kostoj de iliaj vojaĝoj kaj loĝado jam estas grandega ŝarĝo al ilia buĝeto. El la kolektita mono ĉe ESF ni povus helpi ilin ne nur per la studkotizoj, sed ankaŭ malaltigi iliajn financajn ŝarĝojn. Bonvolu kontribui al iliaj studoj. <https://edukado.net/novajhoj?id=770>

III. 7. MANLIBRO PRI INSTRUADO DE ESPERANTO



Je la peto de ILEI nia redaktoro, Katalin Kováts, denove akceptis respondecari pri la redaktado de la nova eldono de la *Manlibro pri instruado de Esperanto*, des pli ĉar ankaŭ la antaŭajn eldonojn ŝi redaktis. La nuna eldono estos funde ŝanĝita, multloke aktualigita. Aperos novaj artikoloj, kaj malaperos kelkaj malnovaj. En la kompilado de la nova libro partoprenos malpli da aŭtoroj ol en la antaŭaj versioj, tial espereble la libro estos pli kohera kaj travidebla. La laboro komenciĝis en printempo 2019 kaj la atendebla eldonto estas somero 2020.

En la provlegado de la libro, precipe de tiuj de la novaj artikoloj, partoprenas la provlega laborgrupo de edukado.net, kies volontuloj por la markado de la eraroj uzas la specialan *ruĝan krajonon* de la retejo, kio



multe faciligas la laboron de la redaktoro.

Laŭplane la libro atingeblos ankaŭ rete, kio ebligos konstantan aktualigon kaj pliriĉigon de la materialoj, aldonon de rektaj retaj ligiloj.


III. 8. PROGRAMISTA LABORO KAJ KOSTOJ

Kvankam la retejo teknike fariĝis tre malnova kaj nepre baldaŭ renovigenda, en la jaro 2019 ni farigis preskaŭ neniun ŝanĝon, krom kelkaj bazaj riparlaboroj, ekzemple ni anstataŭigis la ne plu funkciantan Flash-programon, por ke en la Klerigejo eblu aldoni dosierojn kaj dokumentojn. Bedaŭrinde pro la sama Flash-problemo ni perdis la belan animitan parton de la Katalogo, kie ni povis laŭvice vidigi la librojn.



Nia programisto laboris pri la datumbazo, kiun li nepre devis ŝanĝi al multe pli sekura sistemo, kaj konverti poste ĉion al plena unikodo, prepare al la adapto de la retejo por la pli nova versio de PHP kaj posta transiro al nova servilo. (Mi petas, ke neniu demandu min, kion tio signifas. ☺)
Danke al la nova kontrakto kun GAUS pri la nova gastejo de la servilo kaj la ĝisdatigo de la retejo, en 2018 kaj en 2019 ni apenaŭ havis paneon en la retservo. Ni renovigos la kontrakton ankaŭ por 2020.

III. 9. MONKOLEKTA KAMPANJO - DONACOJ POR LA KILOMETROJ DE KATALIN



Kutime ni lanĉas monkolektan kampanjon okaze de nia datreveno, la 15an de decembro. En la jaro 2019 ni ne faris tion, ĉar la kampanjo en 2017, la vendado de la Zamenhofa-puzlo, daŭris ankoraŭ komence de la jaro 2019. Ni tamen faris iun alian agadon, nome Katalin kaj Sylvain partoprenis la 4-tagan marŝadon en Nimego, kiu estis la plej granda amasmarŝado de la mondo, kun partopreno de ĉ. 40 mil personoj.

Por kolekti monon por la nova projekto *Kunpaŝado* Katalin petis la membrojn de edukado.net subvencii per elektita sumo la 140 kilometrojn, kiujn ŝi faros.

Venis promesoj de 4 639,63 eŭroj (po 33,1 eŭro por ĉiu kilometro), sed fine la kontojn de edukado.net atingis 4 108,34 eŭroj.

Bonŝance plurdekoj da personoj, eĉ sen kampanjoj donacis monon por la paĝaro, kaj tiel en 2019 kuniĝis 8 446,04 eŭroj da donacoj.

<https://edukado.net/kunpashado>

III.10. DANKON AL LA KUNLABORANTOJ KAJ AL ESF

La redaktoro de edukado.net kore dankas ĉiujn, kiuj per informoj, materialoj kaj financaj kontribuajtoj helpis la laboron, per informado kaj varbado diskonigis la servojn de la paĝaro aŭ dum UK asistis en la kursoj kaj ekzamenoj.

Aparta danko iru

al **Mogens Rude Andersen** (Danio) pro la helpo en RISKO kaj korektado de tekstoj;

al **Robert Bogenschneider** (Finnlando) pro la laboro en la panteonaj prezentoj kaj korektadoj;

al **Peter Weide** (Danio) pro la regula reviziado de ekzercoj;

al **Mónika Molnár** (Svislando);
Víctor Solé (Katalunio);
Malcolm Jones (Britio);
Paweł Fischer-Kotowski (Pollando) kaj
Sylvain Lelarge pro la diligenta korektado per la ruĝa krajono.

Multe helpis ankaŭ **ĉiuj onkloj kaj onkloinoj**, kiuj disponigis sesiojn por la komencintoj.

Ni dankas **Bart Demeyer** (Belgio), kiu per volontula laboro kreis por ni la provversion de la paĝaro por *Kunpaŝado* kaj mastrumas ĝin,
kaj **Miguel Rocha Bento** pro la helpo en *Ekparolu!*.

Aparta danko iru al ESF, <http://www.esperantic.org/en/home/>, usona fondaĵo, kiu ĝiras ĉiumonate honorarion al la redaktoro.



IV. PLANOJ POR LA JARO 2020

La ĉefaj agadoj en 2020 koncentriĝis je la sube listigitaj punktoj.

IV. 1. KUNPAŜADO



Ni planas daŭrigi la konstruon de la projekto. En tiu laboro estas du ĉefaj taskoj: trovi haltejojn, kontakti Esperanto-lokojn, centrojn, privatulojn, inviti ilin partopreni en la projekto, preparigi al ili prezentojn kaj tiujn engaĝigi al nia itinero-paĝo, krei tekstojn, testojn en la KLERIGEJO²⁵, kie publikiĝas la novaj materialoj tuj kiam nia karavano atingis la koncernan lokon.

Alia tasko estas diskonigi la programon kaj trovi plurdekojn da novaj paŝantoj, kiuj kun la nunaj pretos testcele trairi la itineron, marki siajn kilometrojn kaj en la dua parto de la jaro partopreni en la diskuto pri la definitive konstruota paĝaro.

Ni planas okazigi ankaŭ ĉeestajn, verajn paŝadojn en grupoj, kiel renkontiĝojn de la *Kunpaŝantoj*, ekzemple dum UK kaj aliaj aranĝoj.

La paĝo de la projekto: <https://edukado.net/kunpashado>

Nia Facebook-grupo: <https://www.facebook.com/groups/429842320878097/>

IV. 2. KLERIGEJO – LIBERAJ STUDOJ

<https://edukado.net/klerigejo>

- En 2020 nia dua ĉefa fokuso iros al la KLERIGEJO, kie ni finfine deziras lanĉi la delonge planitajn kursojn pri profesioj, nome specialan serion, en kiu oni povas prezenti sian hobion kaj instrui pri metioj, kompreneble en Esperanto.
- Kadre de alvoko ni invitas fakulojn pretigi materialojn.
- UEA kontaktis nin kun la deziro loki ĉe la KLERIGEJO la filmojn de konkurso *Mia Asocio, Mia Urbo* kaj ni aldonos testdemandojn.
- Alia kolekto estos prezentoj de loĝlokoj, turismaj priskriboj de urboj, vidindaĵoj. Tiu materialoj formos la bazon de nia nova projekto *Kunpaŝado*.
- Nova paŝo estos, ke ni kreos rete fareblan teston je la nivelo B1, B2 kaj C1 por helpi al la kandidatoj de la KER-ekzamenoj testi sin antaŭ ol elekti la nivelon je kiu ili ekzameniĝos.

IV. 3. KURSEJO

<https://edukado.net/kursejo>

- Ni daŭrigos la fortan stimuladon de la kolegoj al registrado de kursoj, precipe en la nove kreita universitata sekcio. Ankaŭ en 2020 la sekcio *Instrumaterialoj* estos malfermita por tiuj, kiuj registras siajn kursojn kaj agadojn.

²⁵ Sekcio de edukado.net kun multaj kursoj kaj materialoj por distanclernado

IV. 4. EKPAROLU!

<https://edukado.net/ekparolu>

- En la kvara aktiva jaro de la programo ni planas lanĉi eĉ pli da reklamoj ol ni faris antaŭe kaj trovi genevojn, kiuj vere ne nur aliĝas, sed ankaŭ mendas sesiojn.
- Ni planas havi en Montrealo apartan tablon ĉe la Movada Foiro, kiun prizorgos Margaret Zaleski-Zamenhof kaj kelkaj geonkloj kaj genevoj por disvastigi tie la servojn.
- Ni volas daŭre premii niajn plej diligentajn geonklojn kaj serĉas donacojn por ili.
- Observeblis antaŭe, ke venis al la retejo donacoj de geonkloj kaj genevoj. En 2019 tiaj donacoj malmultiĝis. En la estonteco tiuforman rekompenco de la genevoj ni daŭre bonvenigos.
<https://edukado.net/ekparolu/subtenantoj>


IV. 5. MANLIBRO EN LA RETO

En punkto III.7 ni jam raportis pri la nova eldono de la *Manlibro pri instruado de Esperanto*, kiun nia redaktoro kompilas. Interkonsente kun ILEI kaj E@I la materialo de la libro aperos ankaŭ en la reto, kiun prizorgos edukado.net. La reta versio estos pli detala, kun ligoj al la aluditaj ekzemploj kaj lokoj. En 2020, post la apero de la libro, ni komencos krei tiun paĝon por la *Manlibro* kaj planas fini tiun laboron en 2021.

IV. 6. KER-EKZAMENOJ

<https://edukado.net/ekzamenoj/ker>

- La redaktoro de edukado.net daŭre prizorgos, kiel estro de la *Konstanta Ekzamena Sekcio* (KES) de UEA, la organizadon kaj realigon de la KER-ekzamenoj. Tiu laboro portos iom da mono ankaŭ por la retejo, ĉar UEA pagas po unu eŭron post ĉiu ekzamenaliĝinto kaj po 5 eŭrojn post ĉiu lanĉita sesio. Tiu mono ne estas honorario por la redaktoro, sed estas rekompenco por la uzo de la retejo kaj ties programoj kaj servoj.
- Katalin K. planas okazigi la *9an Tutmondan Ekzamentagon* (la 20an de junio), sesiojn en internaciaj aranĝoj kaj kursoj, kiel dum UK en Montrealo, kaj kelkajn aliajn apartajn sesiojn.
- La celo estas atingi almenaŭ 100 sukcesintojn kaj partoprenigi en la ekzamenkampanjon pli da novaj lokoj kaj landoj. Fine de 2019 estis entute 2 407 KER-sukcesintoj el 75 landoj. La celo por 2020 estas atingi 2 500 diplomitojn.
- Edukado.net donacos premion por unu lotumita persono el la ĉi-jaraj ekzamenaliĝantoj kaj unu por la persono kun la atestilo n-ro 02500.
- La aktualajn sesiojn kaj aliĝilojn vi povas vidi ĉi tie: <https://edukado.net/ekzamenoj/ker/sesioj>
- La klerigfilmoj pri la ekzamenproceduroj estas malnovaj, tial Katalin decidis krei novajn en la jaro 2020.



IV. 7. INFORMPAĜOJ

- Verkante la *Manlibron* ni konstatis, ke mankas bonaj resumpaĝoj pri konsilataj legaĝoj, bonaj lerniloj, utilaj aplikaĝoj, radiostacioj ktp. Tial ni decidis realigi tiajn kolektojn kun mallongaj priskriboj ne nur kiel parton de la *Manlibro*, sed ankaŭ kiel apartan sekcion de edukado.net. Por la laboro ni kalkulas je helpo de spertuloj kaj studentoj de la instruista trejnado en Poznan. Interesiĝantoj kontaktu la redaktoron.



IV. 8. KURSOJ, TREJNADOJ – DAŬRA KUNLABORO ANKAŬ KUN ILEI

- Laŭ la nuna situacio nia redaktoro havas la sekvajn programojn kaj kursinvitojn por 2020:
 - Februaro - Pedagogia seminario en Poznan;
 - Marto - Informprelego kun Margaret Zaleski-Zamenhof en ŝia laborejo Klinikogarches, Parizo;
 - Majo - Semajnfina kurso en Hamburgo, Germanio: Katalin pri Van Gogh, Sylvain lingvokurso por komencintoj;
 - Junio - 9a Tutmonda Ekzamentago;
 - Julio - Intensa preparkurso antaŭ UK en Montrealo (Katalin + Sylvain);
 - Aŭgusto - UK: kursoj, prelegoj, ekzamenoj;
Lingvokursoj en Pluezek – Katalin pri Van Gogh, Sylvain lingvokurso;
+ KER-ekzameno;
 - Septembro - Poznan – Instruista trejnado – finekzamenoj/
- En 2020 plu daŭros la helpo por la membroj de ILEI, nome je abono de *IPR* kaj je *Juna Amiko* edukado.net proponas al tiuj *superaj membroj de ILEI* dum 2020 liberan aliron al la instrumaterialoj de la retejo. En 2018 kaj 2019 ne multaj profitis el tiu faciligo, espereble estos pli bona jaro la nuna.
- Kvankam ne temas pri rekta trejnado, tamen gravegan metodologian laboron signifos la reredaktado de la *Manlibro pri instruado de Esperanto*, kiun Katalin Kováts entreprenis en 2019 kaj finos en majo 2020.

IV. 9. DIPLOMLABORAĴOJ

<https://edukado.net/biblioteko/diplomlaborajhoj>

- Nia kolekto de *Diplomlaboraĵoj* enhavas jam entute: **324** laboraĵojn el **41** landoj; kun **1378** elŝutoj kaj **8** komentoj.
- Pro la fakto, ke en Budapeŝto, en la eks-katedro de *Esperantologio kaj Interlingvistiko* la ejoj estis malplenigitaj kaj por la Esperanto-materialoj necesis trovi lokon, oni havis aliron al granda kolekto de fizikaj libroj kun diplomlaboraĵoj, kiuj estas transportotaj al *Herzberg*²⁶. Edukado.net elspezos monon por la kompletigo de la kolekto de diplomlaboraĵoj, trovis personon, kiu pretos registri la ĉe ni mankantajn laboraĵojn. La persono pretos skani la verkojn, kaj post akiro de permesoj alŝuti ilin al la sekcio.
- Ankaŭ en Italio Alessandra Madella okupiĝas pri arkivigo de la italaj diplomlaboraĵoj. Granda parto de tiuj verkoj troviĝas en la urbo Massa. Edukado.net faris paŝojn por konvinki la italajn kolegojn registri tiujn laboraĵojn kaj kompletigi la liston de la jam ekzistantaj 20 en nia kolekto.

IV.10. MALNOVAJ FILMOJ AL CIFERCAJ FORMATOJ

Edukado.net posedas 80-90-horan filmitan materialon pri kursoj, seminarioj, trejnadoj, registritaj antaŭ 10-15 jaroj. Temas pri interesaj eksperimentoj, famaj kursoj kaj prelegoj, modellecionoj ktp. La filmoj troveblas sur malgrandaj videokasedoj (mini DV). Estas nun la lastaj jaroj kiam teknike eblas tiujn materialojn konverti al komputile trakteblaj formatoj. Edukado.net ankoraŭ posedas konvenan filmkameraon kaj akiris aliajn ilojn. La konvertlaboro komenciĝos en aprilo 2020. El la savitaj filmoj en la sekvaj jaroj ni aperigos la valorajn erojn en diversaj formoj.

²⁶ Herzberg = Esperanto-urbo en Germanio, kie funkcias Internacia Centro Esperantista (ICH) un granda arkivejo

IV.11. FILMKURSOJ EN ESPERANTO

Ekzistas du grandaj filmkursoj por la intruado de Esperanto. *Mazi en Gondolando* estas Esperanto-adaptaĵo de la konata BBC-kurso. La alia kurso *Pasporto al la tuta mondo* estas kreita de esperantistoj. Ambaŭ materialoj nun ne plu estas aĉeteblaj, kvankam ili havas valoron kaj povus esti bone uzeblaj en la kursoj kaj instruado de Esperanto. La nun dise troveblajn filmojn, tekstojn, ekzercojn malfacilas trovi, pro tio edukado.net kreas sekcion por tiuj du kursoj por kolekti ĉiujn disponeblajn materialojn kune kaj aldoni niajn detalajn instruplanojn kaj koncernajn ekzercojn por plifaciligi la aliron al ili kaj la pluan diskonigon. Estus bone havi volontulan helpon por tiu laboro.



IV.12. RISKO

<https://edukado.net/ludoj>

En 2020 ni provos allogi pli da novaj ludantoj kaj komencas prepari la stokon de demandoj por eventuala relanĉo de RISKO por libera ludo por ĉiuj ekde 2021. Tio necesigos aldonon de kelkcent novaj demandoj, por kio ni serĉas helpon.



IV.13. BIBLIOGRAFIA LIBRO DE MILA VAN DER HORST-KOLINSKA

Nia longjara sponsoro, *Mila van der Horst-Kolinska*, kiun Katalin kaj Sylvain jam de 6 jaroj flegis en Hago, en 2015 donacis al edukado.net 2300 eŭrojn por la kompilado, enpaĝigo, korektado kaj eldono de ŝia biografia libro *Pri la Destino*. La libro legeblas ĉe: t.ly/dr828 / La korektojn oni povas noti ĉe: t.ly/L1pBV

En 2019 ŝi forpasis, kaj ni petis kaj petas la interesiĝantojn legi ŝian manuskripton kaj helpi korekti la tekton por ke la libro povu esti publikigita en la reto kaj kelkaj paperaj devigaj ekzempleroj povu atingi la bibliotekojn kaj kolektejojn. Ni serĉas provlegantojn, por kiuj ni povos doni ankaŭ financan rekompencan.



IV.14. KONTAKTOJ, KUNLABOROJ

- Ni daŭrigos la kunlaboron inter UEA kaj Edukado.net por la organizo de la KER-ekzamenoj kaj por la okazigo de la paroligaj kursoj dum UK-oj. Al tio aldoniĝas la disponigo de loko ĉe la KLERIGEJO por la filmoj de la konkurso *Mia Asocio, Mia Urbo*.
- Antaŭvideblas plua bona kunlaboro kun ILEI pri interŝanĝo de artikoloj kaj trejnado de instruistoj.
- Ĝenerale imageblas kunlaboro kun landaj asocioj, kluboj, aranĝoj, se ili volas helpon de edukado.net por kursoj, ekzamenoj aŭ trejnadaj. Depende de la laborfortoj, la redaktoro certe respondas al tiurilataj petoj.

IV.15. TEKNIKAĴOJ PRI LA PAĜARO

Ni jam pasintjare anoncis ke la paĝaro bezonas modernigon. Bedaŭrinde tiuj paŝoj ne povis okazi en 2019 pro la okupiteco de la programistoj, tial ni ŝovis la laboron al la jaro 2020.

La lastaj grandaj trakonstruoj de la paĝaro efektiviĝis en 2011, antaŭ 9 jaroj. Tiu periodo estas longa por retejo kaj multaj el la programoj eksmodiĝis.

Ni devas forlasi nian nunan maljuniĝintan servilon kaj transiri al nova, kie neniel povas funkcii la ĝis nun uzitaj kodoj de la paĝaro. Necesos konvertado de la datumbazo kaj antaŭ la transiro zorga testado. Ĉar ne eblas ŝanĝi la kodojn en la malnova servilo, kaj same ne eblas funkciigi la malnovan kodsistemon en la nova, la programisto devos krei transformigajn kaj transkodigajn skriptojn, kiuj poste rapide transmetos la aferojn, sinkronigos ĉion kaj konvertos la tuton al la ĝusta formo. Tiel ni evitos la neceson havi la paĝaron malŝaltita dum tre longa tempo.

Ni esperas, ke tiuj paŝoj senprobleme sukcesos kaj en la postaj monatoj ni povos efektivigi kelkajn modernigojn, ŝanĝojn.

Por funkciigi daŭre la paĝaron kaj efektivigi novajn projektojn ni bezonas financan subtenon.

Tial ni kalkulas je la konsciaj kaj helpemaj membroj kaj petas tiujn, kiuj povas sin dediĉi al regula aŭ porokaza subteno, anonci tion al la redaktoro. La ĝisnunaj tiutemaj informoj estas ĉe: <https://edukado.net/prie/subteno> kaj ties subpaĝoj.

IV.16. NI SERĈAS HELPANTOJN POR DIFINITAJ TASKOJ

La taskoj kaj la laboro pri la paĝaro lastatempe tiugrade kreskis, ke unusola persono ne plu povas prizorgi ĉiun parton. Tage pli ol cent mesaĝoj venas al la redakto el kiuj plurdekoj certe bezonas esti tuj respondataj. Ankaŭ pro sekurecaj kialoj necesas, ke ekestu pli da personoj, kiuj konas la funkciadon de la retejo. Por la sekvaj taskoj bonvenus helpantoj:

- Helpanto por krei la informpaĝojn (vidu IV.8.);
- Helpo por kunigi la filmmaterialojn de *Mazi en Gondolando* kaj *Pasporto al la tuta mondo* (IV.11);
- Provlegado de ekzercoj, ilia enpaĝigo;
- Prizorgado de la panteonaj prezentoj;
- Varbado por *Ekparolu!*;
- Registigo de kursoj (kontakto de kolegoj, trovo de kursoj);
- Serĉado de nefunkciaj ligoj (por programistoj verŝajne facila tasko);
- Kreado de testoj por kontroli komprenkapablon;
- Programista tasko por nia nova projekto *Kunpaŝado*;
- Redaktado de raportoj, senditaj de dumaranĝaj raportistoj, speciale en julio;
- Provlegantoj de tekstoj (nur tre spertajn esperantistojn ni volas laborigi pri tiu tasko).

V. FINANCOJ

V.1. ĜENERALA KLARIGO

- La monrimedoj, kiujn la Fondaĵo mastrumas, normale venas de la sponsoroj kaj donacintoj en formo de mondonacoj. Krom la banka interezo - kiu estas sensignifa sumo - la Fondaĵo ĝenerale ne havas alian enspezon, pro tio ricevis de la nederlandaj instancoj la statuson de **ne-profitcela, bonvola organizaĵo**, danke al kio ni ne devas pagi impostojn.
- En 2019 al la konto de la Fondaĵo Edukado.net enfluis ankaŭ aliaj montipoj, pri kiuj pretiĝis aparta administro.
- Ni havas kelkajn kampanjojn kaj celojn, por kiuj ni kolektas mondonacojn. Tiaj estas ekzemple la KER-kaso por subteni kandidatojn de la KER-ekzamenoj. Tiucele ni ne ricevis donacon en 2019, sed havas ankoraŭ iom da rezervmono.
- Por la **servilkostoj** por 2018 ni trovis sponsoron el Britio, kiu en unu pago kovris la kostojn de 750,89 eŭroj. Por 2019 la sama persono sendis sponsormonon por la servilkostoj, kiujn ni pagos en 2020 kune kun la kostoj de la kuranta jaro, sed por tiu sumo ni ankoraŭ serĉas novan sponsoron.
- Mila van der Horst-Kolinska komence de 2019 esprimis sian deziron, laŭ kiu el ŝia speciala donacmono (donita al edukado.net en 2015) ŝi ŝatus financi la vojaĝkostojn al la UK en Finnlando por la redaktoro kaj ŝia helponto. Laŭ tiu deziro la unuan fojon ĝis nun tiuj kostoj de la redaktoro estis pagitaj el la speciale donacita mono de edukado.net.
- Nia retejo daŭre bezonas riparojn, renovigojn de malnovaj kodsistemoj, kaj modernigojn de kelkaj bazaj funkcioj. Proksimiĝas la tempo, kiam la plej grandan parton de la retejo ni devos renovigi, kaj por tiuj laboroj ni devas multe ŝpari. Ni nun petis proponon pri la kostoj de baza modernigo.
- Ni havas bankokontojn (Rabobank kaj PayPal), sed el la kostoj de tiuj kontoj ni kalkulas nur la kostojn de Rabobank. La kostojn de la PayPal-konto ni ne kalkulas, ni administras nur la pure ricevatajn sumojn.
- Pro la fakto, ke venis nur 4 mondonacoj por *Ekparolu!* ni povis doni premion nur al kelkaj geonkloj.
- Elspezo estas la membrokotizo ĉe ANBI (por la administrado de nia statuso de senprofita, bonvola organizaĵo, kiu ne bezonas pagi imposton en Nederlando). La kotizon por 2019 ni pagis en januaro 2020, do, ĝi aperos en la sekvajara raporto.
- En 2019 ni denove produktigis presitajn informmaterialojn, kiujn ni disdonis kaj disdonos dum aranĝoj. Dum kelkaj aranĝoj ni disdonis la libron *Poŝamiko* al ĵurnalistoj, al gajnintoj de ĉeestaj RISKO-ludoj aŭ partoprenantoj de niaj informprogramoj.
- Ĉar la redaktora laborejo efektive troviĝas en la hejmo de Katalin, ni ne havas elspezon por oficejo kaj ties devigaj elspezoj, sed kalkulas en la buĝeto iom da *burokostoj* (modestan kontribuon por kurento, reto, telefono ktp).

V.2. ENSPEZOJ EN 2019

- Por konservi la statuson de ne-profitcela fondaĵo, la subvencimonon, kiun ESF disponigas por la redaktora honorario kaj vojaĝoj, ni ne enirigas en la buĝeton de la Fondaĵo, sed pri tio ni havas apartan kontrakton inter E-duKati kaj ESF.
- En la jaro 2019 la sumo, kiun la Fondaĵo ricevis pere de la 61 donacoj (estis 113 fojaj donacoj de diversaj personoj) estis **8 446.04 eŭroj** (en 2018 estis 10 327.24). Bedaŭrinde la donacsumo falis, ni perdis regulajn subtenantojn.
- Krom donacoj, la fondaĵo havas nur etan enspezon, ekstreme magran *bankan interezon* (2,87 eŭrojn dum la tuta jaro!!!) kaj pro la administraj kaj retaj kostoj venas en la kason mono (368 eŭroj) **danke al la KER-ekzamenoj**.
- Analizante la donakutimojn, ni povas konstati, ke inter la donacintoj estas unu individuo, kiu regule sendis monatan kontribuon. Estas deko da personoj, kiu ĉiam jarkomence aŭ jarfine sendas subtenmonon. Estas ankoraŭ 3-4 personoj, kiuj jare plurfoje sendas subtenmonon. Ni aparte dankas ĉi tie **Synnöve Mynttinen** (FI), kiu en 2019 donacis 3 400 eŭrojn al nia retejo kaj **anoniman kolegon el Britio**, kiu pagis denove la servilkostojn de 720 eŭroj.

- Estas iom tristige, ke – male al la tendenco de la antaŭaj jaroj – la genevoj ne sentas bezonon donaci monon, kvankam pluraj esprimas sian dankemon. Jes, la servo estas senpaga, sed la konstruo de la sistemo kostis pli ol 12 000 eŭrojn, kaj ni esperas rehavi tiun monon el mondonacoj de la koncernuloj.
- Bedaŭrinde en multe malpli granda nombro observeblas financa kontribuo de la membroj, kiuj regule, eĉ ĉiutage, jam de jaroj ludas kaj kleriĝas en la ludo RISKO. Malgraŭ tio, ke ankaŭ tie ni komence anoncis donacojn, ties sendadon por la anstataŭantoj de la veraj venkintoj ni en la pasintaj du jaroj ne povis plenumi.

V.3. REGULAJ SUBTENANTOJ BEZONATAS

- Estas domaĝe, ke ni ne sukcesis plivastigi la nombron de tiuj, kiuj promesis regule per konkreta sumo subteni la paĝaron, tial ekde aprilo 2018 ni planis ricevi monon pere de la RISKO-ludo kaj komenci instigi la uzantojn de la retejo je mondonacado. La afero ne vere funkciis.
- Por daŭrigi nian laboron, ni bezonas regulan enspezon. Jam sufiĉus, se kelkcent esperantistoj decidus dediĉi ĉiujare malgrandan sumon al la subteno de nia paĝaro.
- Do, iĝu unu el niaj regulaj subtenantoj, por minimume tri jaroj!
- Flankenmetu ĉiumonate la prezon de kelkaj kafoj, glaciaĵoj aŭ cigaredoj kaj sendu la sumon al ni jarfine.
- **Jen la FORUMA parto, kie eblas anonci vian engaĝiĝon:**
<http://edukado.net/komunumo/forumo?f=536&p=1>
- Helpu nin helpi vin. **La pageblojn vi povas trovi** sur la paĝaro:
<http://edukado.net/prie/subteno>

V.4. VOJAĜOJ

En la antaŭaj jaroj ni regule nombris kaj publikigis la kilometrojn, kiujn nia redaktoro faris dum la koncerna jaro vojaĝante al kursoj kaj aranĝoj.

Ĉi-jare ni ne faras tion, des pli ĉar pro la supre menciita sanstato Katalin malpli vojaĝis, sekve la elspezoj estis nesignifaj, aliflanke ili estis financitaj de ESF.

Ŝia vojaĝo kaj tiu de Sylvain Lelarge al UK en Lahtio estis financita el la speciala donaco de Mila van der Horst-Kolinska.

La malgrandajn enlandajn vojaĝojn de la redaktoro ŝi pagis mem, krom du trajnaj vojaĝoj al Roterdamo, en la valoro de sume 20,40 eŭroj.

V.5. MULTFLANKA SUBTENO DE ESF

- *Esperantic Studies Foundation* (ESF), kiel jam de 19 jaroj ankaŭ ĉi-jare, per honorario subtenis la redaktoran laboron. Krom tio invitis Katalin en somero 2019 por partopreni kiel kursano la jubilean Nord-Amerikan Someran Kursaron (NASK), kie Katalin la unuan fojon en sia vivo ne instruis, sed partoprenis kaj ĝuis la seminariojn, gvidatajn de la kolegoj.
- Surloke ŝi aranĝis, ke la du pranepinoj de Zamenhof partoprenu kaj okazigu programon por la kursanoj, kio havis grandan sukceson.
- La sumoj, per kiuj ESF subtenis la agadon de la redaktoro, venis al la UEA-kontoj aŭ kelkfoje eniris la konton de la fondaĵo, sed ne kalkuliĝas kiel donacoj aŭ enspezoj, same kiel la menciitaj vojaĝoj ne aperas kiel elspezoj de la fondaĵo.



V. 6. DONACOJ POR EDUKADO.NET EN LA JARO 2019

<https://edukado.net/prie/subteno/listo>

	Nomo	Lando	Sumoj ĝiritaj netaj		Dato	Maniero
1	Paulino Meliz	Hispanujo	100	100	2019-12-31	Rabobank
2	Bert de Wit	Nederlando	200	200	2019-12-31	Rabobank
3	Margaret Symoens (monata subteno)	Belgujo	10	10	2019-12-31	Rabobank
4	Katja Lodor (Kunpaŝado)	Belgujo	140	140	2019-12-31	UEA
5	HEINZ WILHELM SPRICK	Germanujo	50	50	2019-12-31	Rabobank
6	Inaqui Sand	Meksiko	10	9.11	2019-12-16	PayPal
7	Christian HERBETTE	Francujo	50	47.95	2019-12-16	PayPal
8	Sheila Devlin	Usono	23.55	21.93	2019-12-11	PayPal
9	M & G Lelarge (Kunpaŝado)	Francujo	28	28	2019-12-11	kontante
10	Gerald und Stefania Tucker	Germanujo	50	50	2019-12-05	Rabobank
11	Margaret Symoens (monata subteno)	Belgujo	10	10	2019-11-29	Rabobank
12	Ina Tautorat	Germanio	200	200	2019-11-29	UEA
13	Paul QUEVY LEFEVRE	Francujo	50	47.95	2019-11-15	PayPal
14	Margaret Symoens (monata subteno)	Belgujo	10	10	2019-11-01	Rabobank
15	Bruno HENRY	Francujo	26	24.77	2019-10-22	PayPal
16	Margaret Symoens (monata subteno)	Belgujo	10	10	2019-10-01	Rabobank
17	Paweł Fischer-Kotowski	Pollando	10	10	2019-09-23	Rabobank
18	Mallely Martínez (Kunpaŝado)	Meksiko	20	20	2019-09-20	Kontante
19	Zofia Rogalska (Kunpaŝado)	Pollando	50	50	2019-09-20	Kontante
20	Carlos Gonzales Spinola	Hispanujo	100	96.25	2019-09-19	PayPal
21	Nathalie Kesler	Francujo	60	57.61	2019-09-17	PayPal
22	Iv Deance Bravo y Troncoso	Meksiko	10	9.11	2019-09-17	PayPal
23	Patrick Morando	Italujo	30	30	2019-09-09	Rabobank
24	Eric Nemes (Ekzercoj)	Belgujo	52	52	2019-09-05	Rabobank
25	Margaret Symoens (monata subteno)	Belgujo	10	10	2019-09-01	Rabobank
26	Marielle Martin	Francujo	200	192.85	2019-08-25	PayPal
27	Ineke Emmelkamp (Kunpaŝado)	Nederlando	140	140	2019-08-22	Rabobank
28	Peter Wraae	Danujo	52	52	2019-08-21	UEA
29	Ankie kaj Nanne de Kajto (Kunpaŝado)	Nederlando	50	50	2019-08-16	Rabobank
30	Sylvia Hämäläinen (Kunpaŝado)	Finnlando	50	50	2019-08-15	Rabobank
31	PAUL QUEVY LEFEVRE (Kunpaŝado)	Francujo	75	75	2019-08-14	Rabobank
32	Maurizio Giacometto (Kunpaŝado)	Britujo	25	23.8	2019-08-13	PayPal
33	Jean-Pierre kaj Josette Ducloyer (Kunpaŝado)	Francujo	50	50	2019-08-12	UEA
34	Nancy Fontannaz (Kunpaŝado)	Svislando	150	150	2019-08-09	UEA
35	Gisela Macioszek (Kunpaŝado)	Germanujo	140	140	2019-08-08	UEA
36	Margaret Symoens (monata subteno)	Belgujo	10	10	2019-08-04	Rabobank
37	Monique Arnaud (Kunpaŝado)	Francujo	30	30	2019-08-01	UEA
38	Ilona Koutny (Kunpaŝado)	Pollando	150	150	2019-08-01	UEA
39	Jean-Pierre Boulet (Kunpaŝado)	Francujo	15	15	2019-08-01	UEA
40	Liru CHEN	Tajvano	17	17	2019-07-31	UEA
41	Anna Bennett (Kunpaŝado)	Usono	140	140	2019-07-26	Kontante
42	Aini Vääräniemi (Kunpaŝado)	Finnlando	100	100	2019-07-26	Kontante
43	Anke Brouwer (Kunpaŝado)	Svislando	25	25	2019-07-24	Kontante
44	Yoko Kobayashi (Kunpaŝado)	Japanujo	30	30	2019-07-24	Kontante
45	Mónika Molnár (Kunpaŝado)	Svislando	25	25	2019-07-24	Kontante
46	Luigia Oberrauch Madella (Kunpaŝado)	Italujo	50	50	2019-07-24	Kontante
47	Martin Lelarge (Kunpaŝado)	Nederlando	70	70	2019-07-23	Rabobank
48	Synnöve Mynttinen (Kunpaŝado)	Finnlando	1410	1410	2019-07-23	Rabobank
49	Giorgio Denti (Kunpaŝado)	Italujo	21	21	2019-07-23	UEA
50	Richard Keijzer (Kunpaŝado)	Nederlando	25	25	2019-07-23	Rabobank
51	Carlos Spinola (Kunpaŝado)	Hispanujo	100	100	2019-07-23	UEA
52	Nitta Takamichi (Kunpaŝado)	Japanujo	84.6	84.6	2019-07-23	UEA
53	Hazel Green (Kunpaŝado)	Aŭstralio	75	70.6	2019-07-22	PayPal
54	Margaret Zaleski-Zamenhof (Kunpaŝado)	Francujo	200	200	2019-07-22	Korante
55	Familio Slezak (Kunpaŝado)	Hungarujo	100	100	2019-07-21	Kontante
56	Ricardo Biurrun Gonz (Kunpaŝado)	Hispanujo	150	144.55	2019-07-20	PayPal
57	Francis Desmares (Kunpaŝado)	Francujo	20	18.97	2019-07-20	PayPal
58	Ben Speakmon (Kunpaŝado)	Usono	160.00	152.61	2019-07-20	PayPal
59	Sheila Devlin (Kunpaŝado)	Usono	25	23.55	2019-07-15	PayPal
60	Bert de Wit (Por Kunpaŝado)	Nederlando	70	70	2019-07-15	Rabobank
61	Synnöve Mynttinen	Finnlando	1000	1000	2019-07-04	Rabobank
62	Margaret Symoens (monata subteno)	Belgujo	10	10	2019-07-02	Rabobank
63	Ilton de Lima	Brazilo	10	9.11	2019-06-26	PayPal

64	Margareta Symoens (monata subteno)	Belgujo	10	10	2019-05-31	Rabobank
65	Margareta Symoens (monata subteno)	Belgujo	10	10	2019-04-30	Rabobank
66	Rafal Moscinski	Pollando	26	24.77	2019-04-13	PayPal
67	Hazel Green	Aŭstralio	70	65.87	2019-04-04	PayPal
68	Nicole Margot	Svislando	44.25	44.25	2019-04-04	UEA
69	Margareta Symoens (monata subteno)	Belgujo	10	10	2019-04-02	Rabobank
70	Gisela Macioszek	Germanujo	250	250	2019-03-19	UEA
71	Vitor Mendes	Brazilo	10	9.11	2019-03-17	PayPal
72	Herman Deceuninck	Belgujo	25	23.8	2019-03-14	PayPal
73	Krzysztof Golwiew	Pollando	26	26	2019-03-13	PayPal
74	ANJA KUHANEN	Finnlando	100	100	2019-03-11	Rabobank
75	Manuel Parra	Hispanujo	100	100	2019-03-10	UEA
76	Margareta Symoens (monata subteno)	Belgujo	10	10	2019-03-03	Rabobank
77	Gisela Macioszek	Germanujo	150	150	2019-02-18	UEA
78	Synnöve Mynttinen	Finnlando	1000	1000	2019-02-04	Rabobank
79	3000 VZW (monata subteno)	Belgio	10	10	2019-02-04	Rabobank
80	Gerald und Stefania Tucker	Germanujo	50	50	2019-02-01	Rabobank
81	Margareta Symoens (monata subteno)	Belgujo	10	10	2019-02-01	Rabobank
82	SYLVIA HAMALAINEN	Finnlando	120	120	2019-01-29	Rabobank
83	Joseph van der Vleugel	Belgujo	60	57.61	2019-01-09	PayPal
84	Anonima	Svedujo	10	9.31	2019-01-03	PayPal
85	3000 VZW (monata subteno)	Belgujo	10	10	2019-01-02	Rabobank
86	A.A. Pijnacker	Nederlando	25	25	2019-01-02	Rabobank
En	2019		8493.01	8446.04		
	2018		10416,57	10327.24		

Se vi sendis monon kaj ne trovas vin en la listo, bv. tuj kontakti la redaktoron.

Listo de la sponsoroj: <https://edukado.net/prie/subteno/listo>

Listo de la regulaj kontribuantoj: <https://edukado.net/prie/subteno/regulaj>

Se en 2019 aŭ poste vi sendis mondonacon de 52, 26 kaj 5 eŭroj aŭ pli altajn sumojn (laŭ via landkategorio <https://goo.gl/vZjkzv>) vi rajtas havi aliron al la instrumaterialoj dum unu jaro ekde la monsendo. Pagintoj de pli altaj sumoj havas aliron proporcie kun la donaco. Sponsoroj ne havas limigon. La administro de tiu parto ne estas aŭtomata, tial vian deziron je tiu rajto bv. anonci al la redaktoro.

V. 7. RESUMA FINANCA TABELO

	2014	2015	2016	2017	2018	2019	
Ricevitaj donacoj laŭ fojoj		84		149	115	86	
Individuaj diversaj	87	48	102	90	71	60	
Donacoj de grupoj	14	16	14	13	14	2	
Novaj sponsoroj	6	3	1	1	4	0	Ekde 500 eŭroj
Jarkomenca bilanco	13 357,23	19 394,66	24 256,62	19 332,07	23 765,98	29475.31	
Donacoj Entute	21 386,16	14 839,19	11 234,57	12 437,58	10327.24	8446.04	Detaloj por sponsoroj en la sekvaj paĝoj
Aliaj enspezoj	156,41	98,09	36,44	323,87	429.02	370.87	
Sume enspezoj	21 542,57	14 937,28	11271,01	12 761,45	10756.26	8816.91	
Elspezoj	-15 505,10	-10 043,31	-16 195,56	- 8 327,54	-5047.11	-3847.22	
Jara bilanco	6 037,47	4 893,97	-4924,55	4 433,91	5709.15	4969.69	
Tutbilanco jarfin	19 394,66	24 256,62	19 332,07	23 765,98	29475.31	34445.00	

La publika parto de la raporto ĉi tie finiĝas. La pli detala financa raporto disponeblas nur por la sponsoroj kaj subtenantoj. Viajn demandojn aŭ komentojn pri la raporto kaj nia agado vi povas publike starigi en la FORUMO: <https://edukado.net/komunumo/forumo?f=750> aŭ skribi al la redaktoro.

Raportis Katalin Kováts, redaktoro redaktanto@edukado.net

La raporton aprobis la estraro de la Fondaĵo Edukado.net 22-an de marto, 2020.

Dankon pro la provlegado al: Mogens Rude Andersen, Pawel Fischer-Kotowski, Malcolm Jones, Victor Solé, Mónica Molnár, Margaret Zaleski-Zamenhof kaj Sylvain Lelarge.